



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 170, Aprilo 2024**



八ヶ岳囲碁合宿への参加をお待ちしています

2024年5月18日（土）— 19日（日） 八ヶ岳エスペラント館
Maja kunsido: 2020.5.18-19 Jacugatake-Esperanto-Domo

山梨県北杜市にある日本エスペラント協会の研修施設「八ヶ岳エスペラント館」は、この季節、新緑でとても美しくなります。新緑と静謐の中で、囲碁を楽しみませんか。皆さんの参加をお待ちしています。

場所：八ヶ岳エスペラント館（電話 03-3491-1349）

（中央線小淵沢で小海線に乗り換え、一つ目の駅甲斐小泉駅下車徒歩 10 分）

会費：3000円（食費は別。近所のレストランから釜めしを取ります）

申し込み：堀泰雄まで。メール：horizonto@r.water.sannet.ne.jp

電話・ファックス：027-253-2524

手紙：371-0825 前橋市大利根町 2-13-3

午後 2 時ごろから対局を始めます。翌日は、午前中で終了します。

Maja kunsido la 18an de majo – la 19an de majo en Jacugatake-Esperanto-Domo.
Kontaktu s-ron HORI Rete: horizonto@r.water.sannet.ne.jp
Telephone: 027-253-2524

JEGA 第42回新春囲碁大会

日時： 2023 年1月 8 日(成人の日) 10:30~16:00 場所： 大崎囲碁クラブ



左から、森均さん、高野富輝夫さん、桜井信夫さん、堀泰雄さん、木下恒さん
De maldekstre Mori Hitoši, Takano Fukio, Sakurai Nobuo, Hori Jasuo, Kinošita Hisaši

La 42a Novjara Go-konkurso de JEGA

Ni okazigis la 42an Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 8an de januaro 2023 ekde la 10 :30 ĝis la 16:00a

Loko : Go-klubo de Oosaki en Tokio

Rezulto:

La unua loko: Sakurai Nobuo (7a dano), 3 venkoj kaj 1 malvenko

La dua loko: Kinošita Hisaši (4a dano), 2 venkoj kaj 2 malvenkoj

La tria loko: Mori Hitoši (7a dano), 2 venkoj kaj 2 malvenkoj

Multaj karaj go-istoj forpasis dum la pasintaj 10 jaroj, kaj nun estas malfacile kolekti sufiĉajn membrojn. Ĉi-foje s-ro Takano Fukio nove membriĝis kaj ni kvin povis ĝui la kunsidon.

Goperfekt, Noveca go-programo


Estimata s-ro Hori,

Mi ricevas de vi la revuon Go-Amiko, kiun mi legas kun intereso. Mi skribas al vi nun kiel al go-ludanto. Ni kelksekunde renkontiĝis en la montreala UK, sed vi eble ne memoras tion. Mi loĝas en Montrealo kaj kunordigis la lastan eldonon de la Esperanto-versio de *La Eta Princo* (2010).

Mi nun ekdisvastigas la beta-version de nova go-programo kun la nomo **Goperfekt**. La programo enhavas Esperantan version, krom anglan kaj francan. Ĉu indus publikigi en Go-Amiko la kunsenditan artikolon, kiu mallonge prezentas la programon kaj proponas al go-ludantoj, kiuj pri tio interesiĝus, provi tiun beta-version de la programo?

Amike salutas vin
Francisko Lorrain

Ĝus aperis la beta-versio de tute alitipa, eksperimenta go-programo, kiun vi eble ŝatus provi. Des pli, ke ĝi havas Esperantan version! Ĝi nomiĝas Goperfekt — iom troiga nomo, agnoskinde. Tiu programo neniel ambicias konkuri kun la pluraj nuntempe tre sukcesaj neŭron-retaj go-programoj. Male, ĝi ofertas tute alispecan sperton. Per Goperfekt, ekzemple, vi povas ludi sur tabuloj el diversaj geometrioj kaj multegaj grandoj: ortanguloj (ne nur kvadratoj), cilindroj, toroj kaj aliaj ekzotaĵoj!



Ludi vi povas kontraŭ vi mem, kontraŭ alia viaflanke ĉeestanta ludanto, sed ankaŭ kompreneble kontraŭ la programo. Vi povas eĉ igi Goperfekt-on ludi kontraŭ si mem!

Vi povas permesi aŭ malpermesi memmortigon, elekti inter tri malsamaj finaj bilancoj kaj kelkaj manieroj nombri la poentojn. Eblas ankaŭ ludi *kaptoludon*, simpligitan formon de goo, ĉe kiu la unua kaptinto venkas.

Bedaŭrinde, por ke Goperfekt mem ludu vi devos kontentiĝi per tre malgranda tabulo, ĝis 16 punktoj maksimume (t.e. 1×16 , 2×8 aŭ 4×4). Tedege? Ne: ludado sur tiaj etaj tabuloj estas amuza distraĵo, foje surpriza, ofte defia. Vi trovos eĉ la kaptoludon, sur la multegaj eblaj tabuloj, sufiĉe interesa. Tamen ne eblas silenti pri grava manko de Goperfekt: sur tabuloj el 12 punktoj aŭ pli ĝi reagis foje ege malrapide. Goperfekt restas ĉefe eksperimenta programo.

Ĝia kreinto nomiĝas Francisko Lorrain, kanada esperantisto, kiu kunordigis la lastan, trian eldonon de *La Eta Princo* aperintan en 2010. La programo haveblas nur por macOS 10.15 ĝis macOS 14. Se vi ŝatus provi la beta-version, vi povas elŭti ĝin el la retpaĝo goperfekt.ca/eo

Francisko Lorrain

揮毫 Kigoo

毛筆で何か文字や文章を下の様に扇子などに書くことを「揮毫」といいます。将棋や囲碁の棋士は職業柄揮毫をする機会が多く、色紙や扇子にサインを求められると自分の好きな言葉や大切にしていることを揮毫します。そのために、書の練習をして上手に書けるようにしているようです。日本棋院の売店などに行くといろいろな棋士の扇子などが売られています。インターネットにも、商品が沢山出ています。

Skribi frazon sur ventumilo aŭ aliaj per kaligrafia peniko nomiĝas « Kigoo ». Ŝak- kaj Go-ludantoj havas multajn okazojn kaligrafii kiel parto de sia profesio, kaj kiam oni petas, ke ili skribu ion sur papero aŭ faldebla ventulilo, ili skribas vortojn aŭ frazojn, kiuj estas plej gravaj por ili. Por la okazoj goistoj trejnas sin en kaligrafiado. Se vi iras al butikoj de Nihon Kiin (Japana Go-Asocio), vi trovos ventumilojn kun kigoo de diversaj goistoj.



闇然而日章（呉清源）



これは囲碁の棋士、呉清源の言葉です。もともとは中国の「礼記」にある「中庸」の一節で、日本語に読み下すと「あんぜんとして ひあきらか」と読みます。そのままの意味は、「ひと目はひかないけれども、日ごとに明らかになる」とのこと。

もともとの文章としては、徳のない人が行うことは人目を引く一方で日に日にその価値がなくなっていってしまうものだが、賢人が行うことは、この「闇然而日章」に従うものだよ、と。日々、積み重ねです。

Ĉi tiuj estas la vortoj de Go-ludanto Wu Qingyuan. Ĝi estas origine pasaĵo pri la ĉapitro "Modereco" de la ĉina "Raiki", kaj la laŭvorta signifo estas, « Eble ĝi ne kaptas alies okulon unuavide, sed ĝi fariĝas pli klara tagon post tago. » La originala teksto signifas, ke tio, kion faras homo sen virto, altiras la atenton komence sed perdiĝas tagon post tago, sed tio, kion faras saĝulo, ne tiras atenton komence sed aperas klare tagon post tago. Ni devas trejni nin ĉiun tagon.



約 40 年前、私は囲碁の雑誌を購読していて、投書欄にしばしば投稿しました。その賞品は揮毫入りの扇子でした。上は本因坊剣正（加藤正夫）で、よくわからないが「清雲」か。下は大竹英雄で「洗心」。

Antaŭ proksimume 40 jaroj, mi abonis revuon Go kaj ofte sendis leteron al la paĝo de “Opinioj”. La premio estis ventumilo kun kaligrafio. Tiu ĉi supre estas tiu de Honinboo Kensei (Kato Masao) kun la vorto « Serena nubo » kaj sube estas tiu de Ootake Hideo kun la vorto « Lavi sian koron ».


囲碁の格言 Saĝaj vortoj pri Go-ludado

囲碁の格言を覚えておいて、場面場面でそれを思い出すと、良いヒントにもなるし、冷静になります。

Se vi memoras saĝajn vortojn pri Go-ludo, kaj kiam tiu situacio aperas, vi rememoru tiujn. Vi povas meti ŝtonojn en ĝustajn lokojn, kaj vi povas esti trankvila kaj juĝi ĝuste.

「ノゾキにツガぬ馬鹿はなし」


相手にノゾキを打たれたら、素直にツイでおくべき(ただし上級者は利かされを嫌い、あえてツガずに反発する手を考えることも多い)。



“Ne ekzistas tiu stultulo, kiu ne sinligas kiam enrigardite.”

Kiam kontraŭulo ‘enrigardas’ truon de via ŝtongrupo, vi devus obeeme ‘sinligi’. (Tamen lertuloj ne ŝatas efikigon de kontraŭulo, ne malofte kuraĝe ne ‘sinligas’ kaj kontraŭbatalas alimaniere. Ekzemple, anstataŭ ‘sinligo’ N2, procedas N-a, B-b, kaj N-c.)

「広い方をオサえる」



星から両辺にヒラいている時に三々に入られたら、広くヒラいている方からオサエた方が大きな模様形成が期待できる。左図の場合、白1の三々入りに対しては黒2とオサエれば、下辺に大きな模様が見込める。

“Bloku de pli grandan flanko.”


Okaze vi ŝtonmetis sur stelo en angulo kaj havas du flankan etendanton, kiam la kontraŭulo invadis

sur 3-3 punkton, vi bloku tion de pli grandan flanko kaj faru pli grandan kvazaŭteritorion. En la kazo montrita, kontraŭ invado sur 3-3 punkton, B1, Nigro pli bone bloku per N2 kaj faru grandan kvazaŭteritorion en la malsupra rando.

「ポン抜き 30 目」

特に中央に近い場所でのポン抜きは四方に威力を発揮し、大きな戦力となる。「30 目」は具体的な数字ではなく、大きい価値を持つというたとえ。二目抜いた形はさらに強力で、「亀の甲 60 目」ともいわれる[38]。


“Flora forkapto valoras 30 poentojn.”



Precipe proksime de centro, ‘flora forkapto’ havas grandan influon en ĉiu direkton, kaj fortan potencon por posta batalado. “30 poentoj” ne estas konkreta numero sed figuras la grandan valoron.

La formo post forkapto de du ŝtonoj estas plu forta kaj oni diras, “Testudŝelo valoras 60 poentojn.”

Go-ekzercaro por Komencantoj (33)



(Komencanto havas Nigran.)

Profesiulo: Kial vi ekbatalis per N1 de ĉi tiu flanko?

Komencanto: Mi pensis, ke, se ne, Blanko faros teritorion ĉirkaŭ ĉi tie.

P.: Mi komprenas vian penson.

Tamen, Blanko ne povus plue grandigi la teritorion tiel multe.

K.: Jes...


P.: Aliflanke, ankaŭ Nigro ne havas eblecon por fari granan teritorion ĉi tie.

K.: Do Nigro devus ekbatali de la alia flanko kiel N2?


P.: Jes, principe oni devus ekbatalante ŝtonmeti sur la flankon kun pli granda spaco.

(Adaptita artikolo citita el “Kreskada noto de AMIGO” en japana ĵurnalo “Semajna GOo”)

La problemo 289-a
Nigro havas meton.



La problemo 290-a
Nigro Havas meton.



La solvo 289-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso.

Se vi trovis la vitalan punkton N1, iom facile estas legi la konsekvon. Blanko devas bari per B2 kaj Nigro povas fari 'internan tri aŭ kvar'.

Fig. 2-a: Malsukceso.

B2 sidas sur la vitala punkto. Alternativaj estas punktojn a kaj b. Anstataŭ N1, ankaŭ N-c estas malsukcesa. Sekvas B2, N-a, B-b.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

La solvo 290-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso.

Malfacile trovebla estus N1, per kiu ŝajnus helpi Blankon fari okulon. Blanko ne povas en-ŝtonmeti sur punkton a.

Fig. 2-a: Malsukceso.

B2 sidas sur vitala punkto. Bonvole vi mem studu alian varion.




Fig. 1-a




Fig. 2-a

(cititaj el ĵurnalo "ASAHI SINBUN", verkitaj de YAMADA Kimio 9p.)

El “Ludu Goon IX” turniro sur OGS (2)

Ekde majo 2023 okazas GO-turniro, nomata “Ludu Goon IX” en grupejo “Esperantejo” sur OGS Go-servejo:


<https://online-go.com/group/137>

Jen prezentas antaŭan parton de ludo el la turniro, inter Nigro: max861027 kaj Blanko: mi, mori_kin. Ĉe la komenco de la ludo, Nigro rangis 1 KYUU kaj Blanko 1 DAN en OGS rangosistemo. En la turniro, Nigro pagas al blanko 6.5 ‘egaligajn poentojn (KOMI)’.

Se vi havas konekton al la inter-reto, eble vi povas postludi la ludon ĉe jena ligilo;

<https://online-go.com/game/60276491>

Unue montras la registraĵon de la parto, jene.



B42: rekapto sur B34, N45; rekapto sur N39

procedo en la SupraMalDekstra angulo.

Kontraŭ ‘saltanta tuŝmeto (TOBI-TUKE)’ N23 kaj ‘kontraŭ-bato (HANE-KAESI) N25’, Blanko elektis ‘solidan sinligon (KATA-TUGI)’


Ĉi tiu artikolo ĉefe temas pri tradicia metodo por taksu lokajn procedojn taŭgaj aŭ ne, ekzemple traktante procedon en la SupraDekstra angulo de tiu ĉi ludo.

Antaŭ ol B30, invado sur 3-3 punkton, Nigro ambaŭflake ŝtonmetis ‘larĝe-ĉevalajn etendojn’ (OO-GEIMA BIRAKI), N21 kaj N29.

Antaŭ ol la ĉefa temo unue komentas pri

B26. Ĉi tiam malbona estis Nigra ‘solida sinligo’ N27. Nigro devus ‘diagonale sinligi’ sur punkton unuvoje malsupran, B-15. Ĉar post la sinligo, la nigra ŝtonaro pro manko da ‘okulformo (GAN-KEI:眼形)’ estis atakita de Blanko ek de B54.

Nun, ni studu la procedon en la SupraDekstra angulo.




Maldekstre montras la rezulto de la anstataŭigo; Nigro kaptis blankajn ŝtonojn en angulo kaj Blanko rompis la nigran ‘largê-ĉevalan etendon’.

En ĉi tiu procedo, Nigro forkaptis blankajn 3 ŝtonojn sur punktojn a, b, kaj c. Krome en la ‘alternekaptado (KOU:劫)’ per ŝtonmeto N45 forkaptis 1 ŝtonon B42, ree sur c. Sume Nigro forkaptis 4 ŝtonojn. Aliflanke, Blanko forkaptis nigran ŝtonon sur punkto d, kaj en la ‘alternekaptado’ per ŝtonmeto


B42 forkaptis ŝtonon N39. Do Blanko forkaptis 2 ŝtonojn.

Por taksu la gajno/malgajno de la procedo, estas tradicia metodo ‘TE-WARI(手割)’, kiu signifas ke forigante de rezulta formo senefikajn ŝtonojn, inkluzive jam forkaptitajn, samnombre nigrajn kaj blankajn, kompari kun simila formo rezulta de ĝustaj ŝtonmetoj.




De supra diagramo, forigitaj estas 2 blankaj ŝtonoj jam kaptitaj ĉe la angulo. La nombro de forigitaj blankaj ŝtonoj, adiciante jam forkaptitajn 4 estas 6. Kaj forigitaj estas 4 nigrajn ŝtonojn, kiuj estas interne de nigran teritorion kaj jam preskaŭ ne havas efikon. La nombro de forigitaj nigraj ŝtonoj, adiciante jam forkaptitajn 2 estas 6. Do po ses ŝtonoj por blanko kaj nigro estas forigitaj.

Antaŭ ol Blanka invado sur '3-3 punkton', en tiu ĉi parto sidis 3 nigraj ŝtonoj. En la procedo ekde la Blanka invado, ambaŭ flanko ĉi tien metis po 10 ŝtonmetoj. En la lasta diagramo por analizi, restas 8 nigraj ŝtonoj kaj 5 blankaj ŝtonoj. La diferenco de la nombroj de ŝtonoj nigraj kaj blankaj estas 3 same kiel antaŭ la procedo. Do, se ŝtonmetoj en la procedo estus ĝusta, la rezulto devus esti same avantaĝa por Nigro tenante la avantaĝon de antaŭaj 3 ŝtonmetoj.



Ekzistas 'batalmodelo' kiam Blanko rekte invadi sur '3-3 punkton' sub Nigra 'stelo' en angulo

En tiu ĉi batalmodelo, Nigro kaptis 2 blankajn ŝtonojn kaj Blanko forkaptis 1 ŝtonon N6.




De supra diagramo, forigitaj estas 2 blankaj jam kaptitaj ŝtonoj ĉe la angulo.

Kaj forigitaj estas 1 nigran ŝtonon, kiu ne havas grandan efikon. La nombro de nigraj ŝtonoj, sume de jam forkaptita, kaj forigita pro la senefikeco estas 2. Do po du ŝtonoj por

blanko kaj nigro estas forigitaj. Vi devus rimarki ke en ĉi tiuj du diagramoj, diferenco de la nombroj de nigraj kaj blankaj ŝtonoj estas same 1.

Nun ni komparu la du diagramojn por analizo, unu de la reala ludo kaj la alia de la batalmodelo. En la analiza diagramo de reala ludo, nigraj diferencaj tri ŝtonoj estas ne efikaj; unu estas tro singardema (▲), unu estas tro mallarĝa etendo (●), kaj la alia estas gluita sur blanka forta muro (◻). Tio signifas ke Nigro malsukcesis en la procedo kaj malgajnis multe.

Nu, kiuj el la Nigraj ŝtonmetoj estas kulpaj? Ĉu vi jam rimarkis?



B42: rekapto sur B34, N45; rekapto sur N39

bati(NI-DAN-BANE)' per N49.

En formoj de reala ludo, ofte ne klare estas kiel gajneme/malgajneme estas la procedo. Per la metodo 'TE-WARI(手割)', forigante samnombrajn ŝtonojn ambaŭajn, kaj komparante la analizan formon kun rezulto de ĝusta procedo, lertuloj povas taksii la gajnon/malgajnon de la procedo en reala ludo.

Reaprigas la registraĵon. Mi pensas ke, ne tro malbona estas sinligo N43 post blanka rekapto per B42 en la 'alternekaptado'.

Sed posta rekapto N45 sur supron de forkaptita N39 estas tute malbona. Post kiam Nigro jam sinligis per N43, Nigro ne devus rekapti la 'altenekapton' per N45, ĉar ĉi tiu meto tute senefikigas la antaŭe metitan ŝtonon N43. Anstataŭ la rekapto N45, Nigro devus 'duoble


MORI Hitosi

Sinmortigo ĉe go


Francisko Lorrain

Kiel sciante, ekzistas kelkaj variantoj de la go-reguloj: la japanaj reguloj, la surkontinentaj ĉinaj reguloj, la reguloj de s-ro Ing uzataj de la tajvanaj profesiuloj, la nov-zelandaj reguloj, la tibetaj reguloj, kaj aliaj. Krom la tibetaj reguloj, tiuj variantoj diferencas per relative malgravaj detaloj, kiuj malofte ŝanĝas la manieron ludi.

La demando pri sinmortigo estas aparte interesa. La solaj oficialaj reguloj permesantaj ĝin estas la tajvanaj (elpensitaj de s-ro Ing) kaj la nov-zelandaj. Male al tio, kion oni spontane opinius, sinmortigo povas foje utili. Jen ekzemplo, en kiu du ŝtonoj kaptiĝas per sinmortigo.




Komenca situacio




Sinmortigo de Blanko

Tia ŝtonmeto ne estas vana: ĝi povas utili kiel ko-minaco. Same estas en la sekva ekzemplo, en kiu tri ŝtonoj sin mortigas.




Komenca situacio




Sinmortigo de Blanko

Tamen sinmortigoj povas oportuni ne nur kiel ko-minacoj. Ni ekzameni la ĉi-flankan situacion, prezentitan en unu el la versioj de la Ing-reguloj.


1° Se sinmortigo estas malpermesita, la nigraj ŝtonoj estas mortaj, kiel montras la du ĉi-subaj diagramoj.



Nigro povas ludi 2 kaj 4 aliloke.




Diagramo A. Ekzemplo de s-ro Ing




Poste Nigro povas provi 6, sed tio montriĝas vana.

2° Se male sinmortigo estas permesita, tiam, se la vico ludi apartenas al Nigro, ĉi-lasta povas sin mortigante alveni al sekio:



Nigra sinmortigo




Unu ebla sekvo (5 aliloke)

Jen ĉi-flanke alia sinsekvo post la sinmortigo 1 de Nigro, sed ĝi estas iomete malpli favora al Blanko.

Se ĉe Diagramo A la vico ludi apartenas al Blanko, tiam, eĉ kun sinmortigo permesita, Blanko povas mortigi la tutan nigran grupon. (Mi lasas vin pripensi la aferon.)

Resume, la sinmortigoj povas esti ne nur malrekte utilaj, kiel ko-minacoj, sed ili povas ankaŭ rekte influi la vivon de ŝtongrupo. Ili ja indas je intereso.

Tamen la okazoj por tiaj ŝtonmetoj tre maloftas. Estus interese permesi ilin, sed ni agnosku, ke tio ŝanĝus preskaŭ neniun go-partion. La ĉefa intereso de sinmortigoj eble estus la ebleco krei novan kategorion de inĝeniaj go-problemoj!




Alia ebla sekvo

堀さんのエスペラント情報 Informoj pere de Esperanto

Ciferoj

El malnova kalendaro sendita de francaj gelernantoj mi faris kovertojn. Tamen suba parto kun ciferoj ne estas necesa, do mi fortranĉis tiujn partojn. Rigardante malsaman skribmanieron de ciferoj de francaj lernantoj, mi faris karton (maldekstre). Japanoj miras pro la ciferoj 1 skribita kiel \wedge kaj 7 kun sktreketo kiel *harakiri*.

En la alia estis skribitaj ciferoj en la japana maniero kaj en ĉinaj ideogramoj, kiuj signifas numerojn.



1. Vi pravas, la informoj pri kiel la nombroj estas skribita en Japanio estas vere tre interesa. Mi tre dankas, ke vi montris al ni iom de via kulturo. Kelli (Brazilo).
2. Jes interesa komparo! Telemo (Francio)
3. Mi rigardis la literojn. Almenau en mia juna'agho finnaj infanoj same skribis. Mi rimarkis dum mia korespondado, ke ankau la literojn oni instruas diversmaniere en diverslandaj lernejoj. Nun en Finnlando oni ne plu instruas manskribon, nur la tajpeblan ABCDEF.abcdef.. niaj genepoj ne kapablos legi niajn malnovajn leterojn, taglibrojn ktp. Nun pri la ciferoj 1 kaj 7. Ankau tie oni instruas la tajpajn modelojn. Tiam, skribite mane 1 kaj 7 povas intermiksighi. Tial multaj finnoj uzas streketon sur 7 kaj faras la ciferon 1 sen la hoko, nur vertkalan strekon l, kiu siaparte povas intermiksighi kun litero "lo"! Estas bone scii pri tiaj eblaj miskomprenoj.
Saliko (Finnlando)

Karpoj



La 2an de aprilo el Japanio

La 5an de majo estas Knaba Tago, kaj por la tago oni flirtigas karpojn en la aero. Jam estas aprilo kaj la aero estas freŝa, do mi flirtigis la karpojn la plej frue en Japanio. Miaj karpoj unuan fojon naĝas en tiu ĉi jaro, do ili ankoraŭ ne lertaj en tio. Mi flirtigas ilin ĝis la fino de majo.

Najbare de mia domo estas banko, al kiu venas multaj homoj. Ili miris! Ili murmuris, “S-ro Hori estas stranga. Nun estas sezono de sakuroj, ne sezonoj de karpoj!” Mi ignoras tiujn voĉojn. Mi vivas laŭ mia volo. HORI Jasuo

La 3an de aprilo el Ĉeĥio

Sezonoj ŝanĝiĝas pli frue ankaŭ ĉe ní. Kutime marto en Prago estas malvarma, kun noktaj frostoj, sed ĉi-jare varmaj tagoj venis unu monaton antaue. Do ĉiuj arboj kaj arbustoj jam floras. Mi vidis pigojn sur nesto, ili ankaŭ ne volas plu atendi. Ĉiutage iuj birdoj sufiĉe laŭte kantas antaŭ mateniĝo en ĝardeno apud mia domo. Dum tri tagoj forta vento alportis sablon el Saharo. Kaj kelkaj regionoj suferis pro la sablo kaj vento. En Prago mi sablon ne tro sentis, nur venton.

Oni avertis, ke pro varma vetro pli frue aktiviĝis iksodoj (マダニ). Aperis informojn pri multaj malsanaj homoj, kiuj malsaniĝis pro kokluŝo (百日咳). Mi dum longa tempo ne aŭdis pri tiu malsano, sed ĉi-jare tiuj malsanuloj estis ĉirkaŭ du mil, kaj du maljunuloj eĉ mortis. Neniu specialisto povas diri, de kiu ĝi venis. Olga

La 3an de aprilo el Japanio

Nun multaj japanoj suferas pro poleno el japanaj cedroj kaj ternas. Hori

